Ĉu vi ne ŝatus vojaĝi sen troaj kostoj en fremdaj landoj por ekkoni ilin kaj por interparoli kaj interamikiĝi ankaŭ kun homoj, kies nacian lingvon vi ne scias? Ĉu vi ne ŝatus esti ricevata ĉie kiel frato aŭ amiko, eĉ ne havante konatojn inter ili? Tiel mi komencis la artikolon pri Studvojaĝoj per Esperanto en mia "Guide to Esperanto" (paĝo 47) por atentigi al la amikoj de Esperanto la planon de studvojaĝoj per Esperanto tra la tuta mondo, kiun UEA jam decidis oficiale elprovi. Por praktiki kion mi predikas kaj opiniante, ke universala kongreso de Esperanto kun siaj antaŭ—kaj postkongresaj karavanoj estas la plej bona studvojaĝo, mi decidis vojaĝi ĉi tiun jaron kune kun miaj edzino kaj filino tra Esperantujo kaj partopreni en la 19a Universala Kongreso de Esperanto en Danzig, en la antaŭkongreso en Berlin kaj en la postkongresoj de Varsovio kaj Bialystok.

Tamen, mi decidis, kiel Propagandestro de EANA, survoje ankaŭ (1) propagandi Esperanton, varbi multajn amikojn de Esperanto kaj Kaŭzi ke ili disvastigu nian karan lingvon kaj la internan ideon de Esperanto; (2) konatiĝi kaj interamikiĝi kun multaj samideanoj en ĉiuj lokoj kiujn mi travojaĝos, por priparoli propagandajn rimedojn; (3) plibonigi min en la uzado de Esperanto; (4) konvinki min pri la utileco de Esperanto okaze de studvojaĝoj tra la mondo, precipe en landoj, kies nacian lingvon mi ne scias; (5) pruvi—reveninte al Usono—al miaj samlandanoj la praktikecon kaj la veran spiriton de Esperanto.

Nun mi scias, kiel granda diferenco ekzistas inter vojaĝoj sen kaj kun Esperanto. Dum la someraj monatoj de 1922 kaj de 1923 mi vojaĝis tra Eŭropo precipe por plibonigi min en la uzo de la franca, germana

kaj hispana lingvoj, ĉar mi ilin instruas. Sed, kvankam mi povas paroli kvar lingvojn, mi restis en ciuj landoj **nur fremdulo,** ĉar homoj kiujn mi renkontis interesiĝis pli pri miaj amerikaj dolaroj ol pri mi. Pro tio, kiam mi trovis, ke Esperanto, kies interna ideo jam ensorĉis min en 1912, estas vera vivanta lingvo en la tuta mondo, mi decidis lerni ĝin. En Madrid mi aĉetis gramatikon por studi ĝin sur la franca vaporŝipo "Chicago". Post mia reveno mi faris paroladojnpri la Progreso kaj perspektivo de Esperanto, stargis grupojn kaj kondukis Esperantan movadon en Milwaukee. Poste mi ankaŭ legis kaj aŭdis multfoje pri la utileco de Esperanto al la turisto. Tial mi faris ĉi tiun vojaĝon por kaj per Esperanto, kiu fariĝis serio da travivaĵoj neniam forgeseblaj, kaj kiu konvinkis min, ke la plej agrabla kaj tre ekonomia maniero vojaĝi tra la mondo estas per Esperanto kun Esperantistoj.

Ni veturis per aŭtomobilo al Nov Jorko, per ŝipo al Kopenhago, Danujo, al Malmö, Svedujo, kaj al Sassnitz, Germanujo, per fervojo al Berlin, Magdeburg, Leipzig, Dresden, per aeroplano al Berlin, kaj per karavanoj esperantistaj al Danzig, Varsovia kaj Bialystok. Ĉie mi trovis, ke Esperanto estas la **vera magia ŝlosilo,** kiu malfermas pordojn de hejmoj kaj kluboj kíe ni povas observi homoj en intimaj familiaj rilatoj, vidi la kutimojn kaj karakteron de fremdaj popoloj, eĉ en landoj kies nacian lingvon ne tute ne konas, nome en Danujo, Svedujo kaj Polujo, kaj interrilati kun liberalaj, progresemaj kaj simpatiaj homoj kun altaj idealoj. Ĉie ni trovis koran gastamecon, kaj ĉie ni estis akceptataj kiel bonaj amikoj.

Decas, ke mi nomu almenaŭ kelkajn amikojn kaj spertojn por pruvi miajn asertojn. En Milwaukee gesinjoroj Jungton arangis adiaŭan festenon por ni en sia hejmo, kie naskiĝis Esperanto-Klubo de Milwaukee en 1925. Tiam ni veturis aŭtomobile tra Chicago, Oberlin, Cleveland, Moundsville, Philadelphia, Arden City, vizitante lokajn Esperantistojn. En Nov Jorko gesinjoroj Sayers kore bonvenigis nin. Dum du tagoj Sro. James Denson Sayers estis nia gastema gvidanto tra la mondurbo kaj ankaŭ al esperantista kamfesteno ĉe la Palisadoj. Kiam nia ŝipo "Estonia" forlasis la dokon, kaj kiam ni flirtigis nian amerikan kaj esperantan flagojn kaj samtempe ekkriegis: "Vivu Ameriko! Vivu Esperanto!" tiam ni aŭdis kiel eĥon: "Vivu Esperanto!" kaj "Bonan vojaĝon!" ĉar Sro. D. A. Klaĝin, kium ni renkontis ĉe la festeno, estis tie por adiaŭi nin.

Jen mi ankaŭ volas diri, ke mi neniam dum la vojaĝo forgesis mian devon kiel propagandisto. Miloj da personoj inter Milwaukee kaj Nov Jorko nun konas Esperanton, ĉar al la ekstra kaŭĉuka tubo de nia aŭtomobilo estis aligita granda verda stelo kaj malsupre granda signo kun la vortoj: "Learn Esperanto, the International Auxiliary Language." Mi ankaŭ disdonis multe da miaj propagandiloj per varbi "Amikojn de Esperanto" (pri kiuj mi intencas skribi specialan artikolon). Surŝipe mi faris du paraladojn. Sur la "Estonia" mi parolis pri "la Progreso de Esperanto" kaj sur la "Lituania" pri **"Esperanto kaj ĝia utileco"** al vojaĝanto. Ambaŭ paroladoj estis sekvataj li de enkonduka kurso de Esperanto kun pli ol 60 partoprenantoj. Unu el ili, Sro Viggo Friis Jorgensen, kiam ni elŝipigis en Kopenhago, gvidis nin al la hotelo kaj helpis nin trovi kvar el la dek kvar Amikoj de Esperanto, kies nomojn kaj adresojn Sro Parley Parker Christensen sendis al mi, la lastan jaron. Li ankaŭ kondukis nin al hejmo de gesinjoroj Blicher, kiuj afable akceptis kaj gastigis nin. Posttagmeze ili montris al ni la vidindaĵojn de la urbego kaj vespere akompanis nin al la famkon-

ata amuzloko Tivoli. La sekvantan tagon ni pasigis, alian gajan vesperon en babilado kun du svedaj esperantisjoj Sroj Erik Ernst Anderssohn, en Malmo kaj iris kun ili al la stacidomo por saluti du esperantistojn de Praha. La sekvantan matenon Sro Erik Andersson adiaŭis nin en la sama stacidomo. En Berlin, kien ni flugis de Dresden, ni ĉeestis la lastan kunsidon de la antaŭkongreso kaj aliĝis al unu el la tri karavanoj al Danzig la sekvantan tagon. Per la penoj de Sro Max Blankenheim ni ricevis sur la fervoja linio de Berlin ĝis Swinemünde rabaton 25-procentan kaj sur la ŝiplinio de Swinemünde ĝis Zoppot rabaton de 50 precentoj sed precipe ni povis ĝui la kuneston de multaj samideanoj. En Danzig ni vivis dum unu semajno inter preskaŭ mil esperantistoj de 34 landoj. Kun multaj ni ligis rilatojn de kora amikeco, ekzemple kun la gastema Sro Lothar Heinrichs kaj lia familio. Li interesiĝis pri mi unue per radio, ĉar kvankam mi ne sciis, ke mi havis la honoron esti la Oficiala Delegito de EANA, mi transdonis la salutojn de la usonaj esperantistoj el la radio-stacio Danzig, kiam Sro Heinrichs sciiĝis, ke mi venis de Milwaukee, kie li havas parencojn, kiujn mi nun lokalizis por li.

La kongresa urbo kun sia Somera Esperanta Universitato fariĝis vera ĉefurbo de Esperantujo. Kiel instruisto de lingvoj modernaj mi ĉeestis ankaŭ la fakan kunsidon de la geinstruistoj, amikiĝis kun diverslandaj kolegoj, aliĝis al la Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj kaj abonis al la Internacia Pedagogia Revuo.

Post la neforgeseblaj tagoj en Danzig ni pilgrimadis en granda karavano de pli ol 300 esperantistoj, kie mi promesis, kiel Propagandestro de EANA, dum la solena honorigo ĉe la tombo de l'' Majstro, ke mi faros mian eblon, per ke Usono ne restu kiel lasta lando en la Esperanto-movado en la estonteco. Nia pilgrimado finiĝis en Bialystok ĉe la naskodomo de Zamenhof malkovro de memortabulo kaj kun solena kunsido, kie mi havis la plezuron esprimi ankaŭ miajn ideojn pri propagando.

En Polujo la esperantistoj ŝparis monon, ĉar ĉiu kongresano ricevis per la klopodoj de la Reprezentantaro senpagan vizon kaj fervojan bileton kun 66% rabato, forveturante el Polujo. Specialaj tramvagonoj, senpagaj, al la tombo de l'Majstro kaj por rondveturo tra la urbo estis disponigitaj, kiel en Danzig, kie dum la tuta daŭro de la kongreso ĉiu kongresano rajtis veturi senpage per ĉiu linio de la tramvojaro.

Plue, ĉie ni trovis komplezajn gvidantojn kaj interpretistojn ĉiam pretaj agrabligi nian restadon kaj vojaĝon, eĉ dum la nokto, kiel Sro S. Wajner en Bialystok, kiu kondukis nin tre frue je la tria matene al la stacidomo, kaj kiel Sro Heinrichs, kiu akompanis nin al la hotelo meznokte post la agrabla vespero en lia hejmo antaŭ nia forveturo el Danzig, la sekvantan matenon, kiam li adiaŭis nin persone kaj per floroj en nia kabino.

Dank' al Esperanto kaj al sinodonaj esperantistoj ni havis sukcesan kaj ĝuplenan vojaĝon, kaj ni travivis tagojn de vera intimeco inter amikoj batalantaj por la granda Zamenhofa ideo. Tiu spirita, interna ideo de Esperanto, jen kio instigas nin esperantistojn, Kuniĝi, laŭ la vortoj de Abraham Lincoln: "Kun bovolo al ĉiu, kaj malico al neniu."

F. A. HAMANN,
Propagandestro de EANA.

### PROGRESS OF MEMBERSHIP DRIVE

We give here the progress made by each state in reaching the quota of members and subscriptions called for by the Finance Committee. The first column shows the quota (the same for both members and subscribers) the second column shows the members who have paid this year's dues and the third column those who have subscribed or renewed their subscription to Amerika Esperantisto. It is going to be very interesting to see which state or province will be the first to complete quota.

| State | Quota | Membs | Subs | State | Quota | Membs | Subs | State | Quota | Membs | Subs |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Ala. | 10 | | | Mass. | 100 | 23 | 21 | S. D. | 10 | | |
| Ariz. | 10 | 1 | 1 | Mich. | 100 | 4 | 3 | Tenn. | 10 | | |
| Ark. | 10 | | | Minn. | 100 | 7 | 7 | Tex. | 25 | 2 | 3 |
| Calif. | 100 | 9 | 4 | Miss. | 5 | | | Utah | 10 | | |
| Col. | 15 | 1 | 1 | Mo. | 50 | | | Vt. | 10 | 1 | 1 |
| Conn. | 15 | 3 | 3 | Mont. | 10 | 1 | 1 | Va. | 10 | | |
| Del. | 15 | | | Neb. | 10 | 1 | 1 | Wash. | 25 | 3 | 2 |
| D. C. | 25 | 13 | 10 | Nev. | 5 | | | W. Va. | 15 | 6 | 1 |
| Fla. | 15 | 2 | | N. H. | 15 | | | Wis. | 100 | 3 | 3 |
| Ga. | 10 | | | N. J. | 100 | 3 | 5 | Wyo. | 5 | | |
| Ida. | 10 | | | N. M. | 5 | | | Alaska | 5 | | |
| Ill. | 100 | 4 | 5 | N. Y. | 200 | 13 | 11 | Alberta | 10 | 1 | 1 |
| Ind. | 25 | 3 | 3 | N. C. | 10 | | | Manitoba | 25 | | |
| Iowa | 50 | 3 | 3 | N. Dak. | 10 | | | Ontario | 50 | 2 | 2 |
| Kan. | 50 | 2 | 1 | Ohio | 100 | 11 | 30 | Quebec | 50 | | |
| Ky. | 10 | | | Okla. | 10 | 2 | 2 | Sask. | 10 | | |
| La. | 10 | 2 | 4 | Ore. | 15 | 1 | 1 | B. Col. | 25 | 1 | 1 |
| Me. | 10 | 2 | 1 | Pa. | 100 | 4 | 5 | Mar. Prv. & N. F. | 10 | | |
| Md. | 25 | 6 | 6 | R. I. | 15 | 1 | 1 | | | | |
| | | | | S. C. | 10 | | | | | | |

---

## APPLICATION FOR MEMBERSHIP

Please enroll me as........................................................member of E. A. N. A. in the class of membership indicated.

Classes of membership in E. A. N. A.: 1. Life members $100. 2. Sustaining members $10. 3. Contributing members $3.00. 4. Regular members $2.00. These four classes include Amerika Esperantisto. 5. Regular members without Amerika Esperantisto $1.00.

If you have already paid your dues for this year fill out the membership blank and mark it paid. If you wish to change to another class the dues already paid will be credited on the new class.

## SUBSCRIPTION TO THE ORGANIZATION FUND

I hereby subscribe to the Organization Fund the sum of $................for this Congress year. I enclose $................and will pay the sum of $................ on the first day of December, 1927, and $................on the first day of February, 1928.

## SUBSCRIPTION TO THE BOOK FUND LOAN

I hereby subscribe the sum of $................as a loan to the Book Fund. I herewith enclose the sum of $................and will pay the sum of $................

on the....................day of................................1927, and the sum of $................

on the........................day of................................, 1928.

Date.............................................. Name ..............................................

Post Office.............................................. Street or Route..............................................

## ESPERANTA MOVADO INTER USONANOJ

Oct. 21, 1927. **Kaj aliaj Nordamerikanoj.**

La grava ĵurnalo **"St. Paul Daily News"** anoncas ke C. J. Maas, poŝtestro de St. Paul aprobis la proponon ke ĉiu poŝtistoj liaj edzinoj lernu Esperanton. La klaso por komencantoj kunvenas ĉiulunde je la oka vespere en la ĉefa poŝtoficejo.

**Flint, Mich.**

Je la festeneto en la hejmo de Sinjorino R. A. Blakington sur Beach strato parolis Sro. Saul Jaffe pri Esperanto. Oct. 3, 1927.

**Buffalo, N. Y.**

Dro Hazima Asada kaj lia edzino pasigis kelkajn horojn en Buffalo, N. Y. dimanĉe matene oktobron 20 an envoje de New York al Niagara Falls. De tie la geedzoj daŭrigis ilian vojaĝon al Chicago, Los Angeles, San Francisco kaj Seattle, kie ili enŝipiĝis por Japanujo.

Sro Ivar R. Ekstrand, box 625, Ostrander, Wash., deziras informon pri Esperantistoj en la pacifika Nordokcidento, speciale en jenaj urboj, Tacoma, Centralia, Kelso, Longview, Vancouver kaj Portland. Samideanoj en jenaj urboj estas petataj komuniki kun Sro Ekstrand. En tiu parto de Usono trovas sin centoj da Esperantistoj kiuj devus konatiĝi kaj organizi. Krom Sro Ekstrand nia vigla sekretario Barnes ricevis ankaŭ leteron de Sro. Frank A. Runball, Box 930, Tacoma kaj de Sro. Verna Howe, 606 East Third St., Albany, Ore. Nia asistanto-sekretario Dr. Lehman Wendell estis antaŭ kelkaj jaroj prezidanto de la Pacifika Nordokcidenta Societo en Puget Sound. Sekve ni esperas ke baldaŭ ni havos bonan raporton pri la Nordokcidento.

**James L. Smiley,** nia malnova fervora Esperantisto el Annapolis, Maryland, alsendis multajn abonojn kaj kotizojn kun promeso, ke li sendos pliajn tre baldaŭ. Dankon, frato Smiley.

**Sro Max Amiel,** kiun Green Acre kongresanoj tre bone konas, havas klason de 37 anoj en Novjorko. Krom tio li dissendas kurson dekdu lecionoj pri Esperanto de sendstacio W. A. A. T. en Jersey City kaj de Nov. 9 je la 2:15 postagmeze kaj ĉiun sekvantan merkredon de sendstacio W. G. B. S. la saman kurson. Bonege, Sinjoro, ni tre kore gratulas vin.

**Sro Catharine M. Healy,** 136 St. Paul Place, Brooklyn, kiel nova sekretariino de Novjorka Esp. Societo raportas pri sukcesa malfermo de Barĉo, sezono je kiu okazo ŝi kolektis multajn kotizojn kaj abonojn inter la ĉeestantoj. Inter la nomojn ni notas du elstarantaj, tiu de Sino Sorenson kaj de Sro Morton, Demosteno de niaj kongresoj.

**Fraulino Ann E. Beatty,** Cardington, Ohio, havas ĝis nun la plej bonan rekordon en vigleco. Si sendis **dekkvar abonojn** al A. E. dum lastaj **dekkvar tagoj,** do unu por ĉiu tago.

Vi, kiuj legis pri la Esperanta lernejo en **Wagnalls Memorial** en nia pasinta numero de Am. Esp. interesiĝos pri la novaĵo, ke nia Centra Oficejo ĵus sendis 100 ekzemplerojn de "Fryer's Esperanto Teacher" al tiu institucio.

**Sro John Bovit** de Summit, N. J. abonis donace Am. Esp. por la publike biblioteko en Newark kaj en Elizabeth, N. J. Ni esperu, ke via malavareco alportos bonajn fruktojn.

Nia paca batalanto **Herbert M. Scott,** de Moundsville, W. Va. plendas ke la financa komitato ne donis sufiĉe grandan proporcion al lia ŝtato. Li diras ke ĝi devus esti 150 anstataŭ 15 da anoj por W. Va. Li kondukas

nian aferon tre suksece en sia loko kajni esperas ke li tiel bone ankaŭ faros pri la abonoj, kiel pri la anecoj.

**Sro Hymann Levine** de Milwaukee raportas sukcesan malfermon de la sezono de Milwaukee Esperanta Societo per la parolado de profesoro F. A. Hamann, kiu ĵus revenis de Universala Esperanta Kongreso en Danzig. Kvar kursoj estas aranĝitaj per la Milwauka grupo. Li sendis bonan sumon por kotizoj kaj abonoj.

**Sro Henry Raymer,** tre vigla samideano mendis lernolibrojn por Esperanta grupo en Jasmin, **Sask.,** Canada.

Esperantoj en Denver, Colo., vekiĝas.—

**Sro W. A. Buchheim** mendas lernolibrojn por tiea grupo.

**Sro Stuart Kittredge** de Hartford, Conn. junakaj nova Esperantisto, plena de entuziazmo kaj lia kunulo George A. Lesnick organizis grupon en Hartford kaj mendis aron da "Fryer Teacher" de centra oficejo.

Sro. Kittredge esperas ke ĉe nia venonta nacia kongreso li trovos pli da gejunuloj ol ĉe la kongreso pasinta, kaj ke la ĉeestantoj uzu nian karan lingvon kun flueco kiel sian gepatran.

Sro. D. W. M. Jenkins de Toronto, Can. faras bonan propagandon en sia urbo se ni juĝas laŭ la nombro da eltranĉaĵoj el la tieaj ĉiutagaj gazetoj alsenditaj al la Centra Oficejo.

**St. Petersburg, Fla. "Amikeco Rondo"** laŭ St. Petersburg Times kunevis en la hejmo de Sino Edna H. Ford, 724 Eighth St. North por aŭskulti raporton pri la nacia kongreso en Green Acre. Sino Esther Owen, Flint estas la sekretariino de la loka grupo. Post la kunveno la anoj kaj gastoj ĝuis novan Esperantan kartludon. La venonta kunveno estas alvokita al la Princess Martha hotelo.

**Cleveland College** kunigita kun la Western Reserve University anoncas kurson de Esperanto, kiel moderna lingvo kaj donas plenan krediton al ĉiuj studentoj, kiuj ĝin partoprenas. Oni anoncas du kursojn, elementan kaj superan, trifoje en ĉiu semajno. Profesoro Frank Tomich estas la instruisto. Nia Asocio gratulas al vi, kaj Cleveland Esp. Societo, ke vi atingis tian grandan sukceson.

**Sro. C. W. A. Stearns,** aŭtoro de la "Paĉjo letero" en la pasinta numero de A. E. transloĝis el sia malnova hejmo en Lakewood, N. J., al Newllano, La. "Paĉjo" estas ano de E. A. N. A. de U. E. A., abonanto de A. E., Esperanto, kaj International Language. Ni povas antaŭdiri kun certeco, ke ni baldau pri nova Esperanta grupo en Newllano. Ĉu ne? "Paĉjo"?

**The Esperanto Educational Club** de 578 Jersey Ave., Jersey City. N. J., mendis per ĝia sekretariino Sro Julia Goldzier, lernolibrojn por venonta esperanta kurso en tiu urbo. La grupo ĵus nun petis aniĝon al E. A. N. A.

**Sro F. R. Hall** de Cannon Falls, radia studento de prof. Edwin L. Clark ĉeestis la oktobran kunvenon de Twin City Club" kaj faris dek minutan parvladon en perfekta Esperanta. Sro Hall neniam antaŭe ĉeestis Esperantan kunvenon kaj havis nenian helpon krom tia radia kurso.

**Dr. Tobias Siegel** nia juna, malnova, vigla Esperantisto de la urbego Detroit veturis al la Pacifika Marbordo vizitante la samideanojn en multaj urboj. Ni tre bedaŭras ke la sciigo pri lia alveno al St. Paul alvenis tro malfrue kaj ni ne povis preni kaj premi lian manon, kal saluti lin persone.

**La Konsilantaro de la Gradata Esperanta Societo en Chicago** kunvenis ĉe 365 W. Madison strato por ĝui vesperon de familiaraj ludoj, kiuj estis tradukitaj en Esperanton.

Refreŝigiloj de kuko kaj kafo estis servitaj de gesinjoroj Maxwell.

## POST-KESTO DE LA REDAKTORO

Sro. Tohofo, Topeka, Kas., mi usos vian artikolon.

**Sro. L. W., Minneapolis, Minn.** Kial vi ankoraŭ ne respondis al mia letero aŭ ne sendis la promesitan artikolon? Mi atendas.

Fino E. W. W., Baltimore, Md. Ankoraŭ tre okupata. Estu pacienca.

Sro E. S. P. Lexington, mi baldaŭ skribos al vi, havas bonan novaĵon

Sro R. S. W., Blairsville, Pa. Dankon por la konsilo. Mi "ĝin" pripensos.

Al Ĉiuj legantoj:—La venonta numero estos Zamenhofa. Estas la monato en kiu naskiĝas nia **"majstro"**. Preparu kaj aranĝu festenojn en ciŭ loko en Norda Ameriko.

Dro Lazaro Ludoviko Zamenhof naskiĝis en Bjelostok la 15 an de Decembro, 1859. (Malnova Stelo: 3d de Dec.).

---

A number of Important Contributions were omitted from this issue for lack of space. They will appear in the December Issue.

---

Make complaints promptly. Courteous complaints promptly made increase the efficiency of our office.

CHARLES W. BARNES, Secretary.


# STUDY ESPERANTO AT HOME

with the University of Minnesota, offering you a Correspondence Study Course.

**NO MATTER WHERE YOU LIVE**

**AUTHENTIC INSTRUCTION**—by an official of The Esperanto Association of North America.

**INTERNATIONAL CONNECTIONS**—Students correspond with Esparantists in other countries.

**SPECIAL GROUP-STUDY PLAN**—Several may study together, for one fee.

**SUPPLEMENTED BY RADIO**—for those in range of WLB, University of Minnesota Broadcasting Station (wave length 245.8; frequency 1220). Wednesdays, 7:30 to 8:30 p. m. over WLB.

For particulars address

**GENERAL EXTENSION DIVISION**

**University of Minnesota** **Room 418** **Minneapolis, Minn.**


RIVERSIDE PRESS, SAINT PAUL, MINN.

**CHRISTMAS CARDS,** beautiful design and emblem greetings in Esperanto, your name and address embossed. Delivery before December 15 all orders received before December 8. Quality guaranteed.

| | 25 cards | 50 cards | 75 cards | 100 cards |
|---|---|---|---|---|
| Grade A | $4.50 | $8.50 | $10.50 | $14.00 |
| Grade B | 5.75 | 11.00 | 14.25 | 14.50 |

Same cards without name, A—**10 cents** each; B—**15 cents** each.

# ABRIDGED BOOK LIST

**INSTRUCTION**

| | |
|---|---|
| Esperanto for beginners..copy | $ .10 |
| The Esperanto Teacher, Fryer ........ copy | .40 |
| Roston's Rapid Esperanto course, M. C. Butler...copy | .25 |
| Spoken Esperanto. Frost, paper ..............copy | .60 |
| Cloth ..............copy | 1.00 |
| Universala Esperantistigilo 4 booklets, illust. ......copy | 1.00 |
| Practical Grammar of Esperanto, Kellerman-Reed.copy | .75 |
| Complete Grammar of Esperanto, Kellerman .....copy | 1.50 |
| Tra La Jaro, Wady (direct method) nur en Esperanto ........ copy | .75 |

**ELEMENTARY READING**

| | |
|---|---|
| Fundamenta Krestomatio, Zamenhof, paper .....copy | 1.25 |
| Illustritaj Rakontoj, Kenngot ................copy | .25 |
| Internacia Dialogaro ....copy | .25 |
| Sep Ridoj, Wendell......copy | .25 |
| Sub la Meznokta Suno, Wendell ........ copy | .50 |
| Rakontoj kaj Aventuroj..copy | .15 |
| La Mopso de Lia Onklo, Chase ........ copy | .15 |
| Prince Vanc', (Bates) Harris ........ copy | .35 |
| Genevra, Privat, drama..copy | .35 |
| Karlo, Privat, narrative..copy | .20 |

**ESPERANTO LITERATURE**

| | |
|---|---|
| Palaco de Dangero, (Wagnalls) Payson ........copy | 1.50 |
| Rozujo Ciumiljara, (Wagnalls) Payson ........copy | .35 |
| Mimi, (Giesy) Payson...copy | .35 |
| Blanch, Maid of Lille, Payson ........ copy | .35 |
| Karto Mistero, La, (Moffett) Payson .............copy | .35 |
| Miserere—Thais ........copy | .50 |
| Akobato de Nia Sinjorino, Payson .............copy | .35 |

**ESPERANTO LITERATURE**—Cont.

| | |
|---|---|
| Patrino Anserino, Stoner.copy | .25 |
| Tri Angloj Alilande, Merchant ........ copy | .35 |
| Morto de la Deligito de UEA, Hohlo, comedy .......copy | .15 |
| Kiel Mi Scias ke la Mortintoj Revenas ............copy | .45 |
| Pro Istar, Luyken.......copy | 1.75 |
| Polando kaj Gdansk.....copy | .50 |
| Kiel Placas al Vi, Shakespeare, Kelerman, lux bind....copy | .75 |
| Pro Kio?, Argus, kriminalromano .............copy | |
| Josef Kaj la Edzino de Potifar ........ copy | 1.75 |

**ESPERANTO LANGUAGE AND HISTORY**

| | |
|---|---|
| Vivo de Zamenhof, Privat.... copy | 1.00 |
| Historio de la Lingvo Esp. cloth, part 1, 1.00; 2d.copy | 1.75 |
| Lastaj Tagoj de D-ro Zamenhof ................copy | .50 |
| Jos. Rhodes, Fruaj Tagoj de Esp. en Anglujo......copy | 1.25 |
| Jarlibro de Lingva Kom. kaj Gia Akademio, 1927...copy | .20 |
| League of Nations Report on Esperanto ...........copy | .15 |
| International Lang. Past, Present, & Future, (Eng.).copy | .40 |

**BIBLES**

| | |
|---|---|
| Nova Testamento, .85, Bible, cloth, plain paper......... | 1.75 |
| Bible, cloth, India paper, 2.50, Morocco, Ind. P........... | 3.50 |
| Bible, Persian Yap, India P... | 5.50 |

**DICTIONARIES**

| | |
|---|---|
| Key to Esperanto, 5c each, 15 for 50c, per hundred...... | 3.00 |
| Handy Pocket Dictionary.... | .15 |
| Edinburgh Pocket Dict. Eng.-Esp. & Esp.-Eng., cloth.... | .60 |
| Fulcher-Long Eng.-Esp., cloth | 2.00 |
| Millidge Esp.-Eng. with index to English words......... | 3.00 |

All inquiries answered promptly. Special prices quoted on orders of 50 or more copies of any of above books.

**ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA**
**Central Office, St. Paul, Minn.**